Esperanto Societo Frankfurto

Junio 2024

Esperanto-Informilo

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto:

Foto: G. Hennemann, 10-a majo 2024. „EO-Informstando antaŭ la EU Parlamento en Strasburgo“

Mesaĝo de la prezidanto:

La Europa Kongreso en Strasburgo kun ĉirkaŭ sescent partoprenantoj (registritraj 596) okazis en serena verda kampo de la Universitato, for de la trafikbruo kaj komercaj kvartaloj. Ĝi estis grandioze organisita kaj ofertis atrakciojn por ĉiajn gustojn. Estis entute tri libroservoj- germana, belga kaj franca - kaj aldone oni povis serĉi kaj ludi diskojn el la diskoteko de vinilkosmo. Vendrede oni povis elekti inter multaj ekskursoj, mi partoprenis la biciklan rondkurson kun posta bierprovado en la bierfarejo “Perle” de kvar diversaj gustoj, unu eĉ kun noto de blanka vino. Interesa fakto estis ke antaŭ 55 jaroj la unua franc-germana kongreso okazis en la sama konstruaĵo kaj eĉ sama salono (amfiteatro) ol la nuna, kaj dum la solena fermo oni montris kelkajn lumbildojn de la tiama kongreso.

Gajan legadon,
Georg Hennemann, 02.6.2024

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender:
Georg Hennemann
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

“Unua mardo”
la 4-an de junio 24
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo
Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

“Tria mardo”

surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt

Dienstag, den 18. Juni, 24	Mardon, la 18-an de junio, 24
18:30 h Sprachrunde	18:30 h Lingvo Rondo
U. Fellmann	
-	-
19:30 h Vortrag "Über den Europa-Kongress in Straßburg“	19:30 h *Prelego* "Pri Eŭropo-kongreso *en Strasburgo“*
G. Hennemann	

“Kvara mardo“
la 25-an de junio, 24
ekde la 19h horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt/Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

El la klubo

Anoncoj:

- 22.6.24 12:00pm — Informstando en la urbocentro, Biebergasse apud Hirthara-Petro-fontano (Struwelpeterbrunnen)

Ekskurso kun ŝanĝita dato: 06.7.24

- 06.7.24 12:00pm — Ekskurso al vulkanurbo Gedern kun gvidata vizito de la kastelo Gedern, Renkontejo: Pizzaria „La Roma“, Otto-Müller-Strasse 20, 63688 Gedern, tablo reservita de 12:00-13:30pm.
- 07.9.24 12:00pm — Migrado apud Heidenrod / Kemel kaj kradrorostado
  Renkontejo: Kradokabano Kemel (Grillplatz Kemel),
  Koordinatojn: Grillplatz Kemer 50°09'39.6"N 8°00'47.4"E
  Pluso-Kodo: 5267+97V, 65321 Heidenrod
  Ekde 12:00pm migrado aŭ veturado de Kemel al Springen kun vizito de la Rozĝardeno en la Aŝramo Bhakti Marga, Am Geisberg 1, 65321 Heidenrod-Springen, Pluso-Kodo: 4XVV+RG Heidenrod

- 5.8. – 15.9.24 — Someraj ferioj de Saalbau-MÜZ

Eventoj en la Rejn-Majn-Regiono:

- 18.05.2024 — nuligita
- 15.06.2024 — ESF-Informstando en la urbocentro
- 20.07.2024 — ESF-Informstando en la urbocentro
- 17.08.2024 — ESF-Informstando en la urbocentro

La demenceca socio

Opinia eseo de G. Hennemann

Estas unu el la plej bone kaŝitaj veraĵoj ke la moderna homsocio delogas nin al neniofarado aŭ eĉ pli malbone al daŭraj distraĵoj kun memdetruaj influoj. Multaj scientistoj kaj kuracistoj jam delonge antaŭdiras kaj admonas ke nia supraĵa senempatia konduto ŝanĝigas nian karakteron kaj povus elvoki tro fruan mensan demencon. Ekzistas eĉ karikaturoj kiuj montras la homan evoluon kaj sian komencitan degeneradon kaj subiron:



Jes, oni ja ne povas nei ke la antropogenozo jam pintiĝis kaj ke ni de nun malevoluas. Jam troviĝas multaj signoj pri tio: La averaĝa vivodaŭro ne plu altiĝas malgraŭ ekesto de la plej bona sansistemo iam ajn. La skalo de demencaj malsaniĝoj eksplodas, malgraŭ ke en germanio ni vivas ankoraŭ en pluraleca, malferma socio. La homoj kaj precipe junuloj suferas pro sendormeco kaj nepras permentajn distraĵojn por elteni ilian sufokan perturban embarasan vivon. Estas permanenta enfluado de novaĵoj kaj por la plimulto la cirkonstancoj ŝanĝiĝas tro rapide. Do kiel kontraŭbarakti tiun fenomenom? Laŭ Dr.med. Michael Nehls, kuracisto kaj habilitigita molekulargenetikisto, ni devas pli akre trejni nian mentalan aŭ mensan akumulatoron. Li dekovris ke la kapacito de niaj mentalaj akumulatoroj ekde jaroj ŝrumpas kaj la sekvoj estas fatalaj. Kiam la mensa energio por refleksioj kaj trapensitaj decidoj malpliiĝas, dominadas simplaj pensŝablonoj, stereotipaj kaj de timo konduktataj agoj. En lia libro “La elĉerpita cerbo” li esploras la fonton de nia mensa energio kaj kial ĝi malpligrandiĝas. Li argumentas ke ni vivas en daŭre elĉerpita socio kun fatalaj sekvoj. „Memestimo, eltenemo, empatio kaj precipe nia mensa flekseblecо malpliiĝas. Rezulte, ni perdas la kapablon kritike pridemandi aferojn kaj preni novajn vojojn, eĉ se ni scias, ke ŝanĝo de direkto estas urĝe necesa - por nia propra bonfarto kaj tiu de la estontaj generacioj.“ Laŭ la sama aŭtoro la Alzheimer-malsano aŭ demenco estas pandemio de memdetruo: „Kronika atrofio de la hipokampo pliigas la riskon disvolvi kronikan depresion aŭ KLS (kronika laceca sindromo), angle: CFS (Chronic Fatigue Syndrom) kaj - kiu ofte rilatas al tio - disvolvi Alzheimer-demencon. La plej verŝajna kandidato por ambaŭ malsanoj estas difektita plenkreska hipokampa neŭrogenezo. En pacientoj kun depresio, sed ankaŭ en frua stadio de Alzheimer, rapida malkresko en la proliferado de nervaj ĉeloj en la hipokampo povas esti detektita.



Abbildung 8: Teufelskreis Frontalhirnschwäche.

Supra bildo estas kopiita kaj elgermanigita el la libro “La elĉerpita cerbo” de Dr. med. Michael Nehls, dekunua eldono; origina eldono de la jaro 2022.

El la kluba historio

Bildoj de la ekskurso al la minejo „Messel“ apud Darmstadt en Julio 2000

Li sendis malĝustan saluton

Rakonto de Ulriko Felmano

Estis matena horo, kiam la specialkomando de la polico en kvar malsamaj urboj kaj je sep malsamaj loĝejoj samtempe rompis pordojn kaj pafilojn enmane laŭte kriis „Polico! Vi estas arestita! Ne movu! Ni pafos tuj kiam ni vidas vin moviĝi aŭ teni armilon!“ En unu de la loĝejoj ili trovis neniun, sed aliloke sukcesis aresti entute dekkvin personoj. Kelkaj provis fuĝi, sed la domoj estis ĉirkaŭitaj de policanoj, en unu okazo fuĝemulo pafis al policanoj, sed feliĉe vundis neniun kaj mem estis trafita per tri kugloj brake kaj krure, ne vivminace.

En la amaskomunikilaro tiu kontraŭkrimulara sukceso furoris dum kelkaj tagoj sinsekve. Oni plejparte laŭdis tiun sukceson kontraŭ dekstremula grupo, kiu planis ŝtatrenverson. Komence tamen multaj ĵurnalistoj kaj komentistoj iom primokis la vortumon „provita ŝtatrenverso“ aŭ „armilapuĉo“. Ili supozis, ke kelkaj frenezuloj pri tio parolis, sed ili opiniis ke tiu grupo konsistis ja el nuraj frenezuloj kiuj ne vere povintus minaci la ŝtaton. „Renversi la germanujan registaron kaj transpreni la regon – ha ha ha!“ Tiaj estis multaj fruaj reagoj.

Tamen, tiu sinteno ŝanĝiĝis, kiam publike distribuiĝis la kolektitaj faktoj: Temis pri parte altrangaj kaj parte riĉaj personoj, unu posedis kastelon en kiu oni renkontiĝis por plani la puĉon kaj ŝtattransprenon dum jaroj, konvinke detale. Oni trovis amasojn da armiloj, komence en la kastelo, poste aliloke. Oni trovis detalajn planojn, kiuj ŝtataj organoj estu kiel atakotaj, kaj kiel la transpreno de la regpovo funkciu. Majoritato de komentistoj kaj homoj tamen opiniis, ke tiuj fanatikuloj ne povintus sukcese puĉi kaj transpreni la registaron, ĉar la civitanoj, polico kaj armeo ja ne kunludintus. Tiel verŝajne estus, sed estis eĉ altrangaj armeaj oficiroj kaj policistoj inter la puĉistoj, kion oni ŝoke konstatis en la poaj organizaĵoj. Aldone, konsiderante kiom da armiloj kaj subtenantoj ili havis, oni ne povas malpravigi la scenaron, ke tiu provuta armile subtenata perforta renverso verŝajne kaŭzintus perdojn de homaj vivoj. Pro la sincereco de la grupanoj kaj la kvanto de armilaro, povas esti ke oni havus centojn da mortinintoj kaj la halto de la renversoprovo estintus tre sanga.

Dum la unuaj preskonferencoj, la estro de la polica specialoperacio parolis ja pri la kvanto de involvitaj homoj, la multaj lokoj kie oni trovis armilojn, ne nur ordinarajn pafilojn, sed ankaŭ rapidpafilojn, mitralojn, grenadojn, ktp. Tamen, oni ne detale aŭdis kiel la operaco funkciis, kiom longe oni la puĉemulojn jam observis, kiel oni sciiĝis pri ili kaj iliaj planoj. Sed iam ĵurnalistoj de la politika esplorteamo de la magazino Der Spiegel malkovris detalojn, kiuj instigis-devigis la policon diri pli kaj konfesi: „La dekstremula puĉistogrupo havis subtenantojn en la polico mem. Tiuj informis la estraron de la ruzuloj kiel ili agu por ne esti malkovrotaj“. Ekzemple tiuj informis, kiam estus nekonvene renkontiĝi en la kastelo, kaj kiu de la puĉistoj iel kaŭzis suspekton ĉe civitanoj kiuj informis la policon pri strangaj okazoj, kiel pafadoj en la arbaro ks. Sekve oni povis tiujn personojn „dormigi“ kaj instrukcii ke ili tempe ne plu partoprenu en kunvenoj por ke la polico ne povis ligi tiun personon al la grupo. Tiuj policinternaj informantoj precipe gravis en Frankfurto, ĉar tie loĝis ankaŭ la ĉefestro de la puĉista grupo.

„Sed kiel vi tamen iam malkovris la decidajn informojn, kiuj necesis por identigi la puĉistan grupon?“ demandis en la oka preskonferenco ĵurnalisto de Der Spiegel. La komisaro hezitis, iom ĝenis lin la punkto, sed fine li ridetis. „Unu de iliaj informantoj ĉe ni en la polica prezidejo iam skribis internan retpoŝtaĵon al la alia informanto, estis responda retpoŝtaĵo, do ĉiuj kiuj en la antaŭa sendaĵo estis en la adreslisto aŭtomate estis nun ankaŭ en la responda. Kaj ruzulo B salutis ruzulon A per la salutvortoj, kiujn ili interne en la puĉista sceno uzas. Li faris

tion verŝajne subkonscie, neintence, ĉar li ja ankaŭ ofte mesaĝis sian kolegon kiam temis pri la puĉistara informinterŝanĝo. Kaj tiu saluto iritis multajn de la aliaj ricevuloj de tiu retmesaĝo. Fine iu sumigis unu kaj unu kaj konvinkis nin, ke tio estas suspektinda. Ni poste do ekobservis tiujn du kolegojn, kaj tiel eltrovis pri la tuta konspiracia reto kaj la puĉistara plano.“

„Kiel estis tiu saluto?“
„Li salutis per „Kara kolego A“, sed la du a-sonoj en la vorto "kara" estis skribitaj per la cifero ok. Tiel...“ La komisaro prenispaperan folion, kaj skribis sur ĝin „K8r8“.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

La bangasto demandas:
- Ĉu ĉi tie ekzistas meduzoj, kankroj aŭ marerinacoj?
La naĝeestro trankviligas lin:
- Ne, la ŝarkoj manĝas ilin ĉiujn.

Proverbo de la monato (de G. Hennemann)
La proverboj, kiujn mi hodiaŭ prezentas, temas pri „troalteca“ sinteno aŭ konduto, kiel observeblas je kelkaj islamaj fanatikuloj kaj ankaŭ multaj ŝtatestroj.

[zam-427.01] „Ne iru okuloj super la frunton.“
[zam-427.02] „Kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas.“
[zam-427.03] “Kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon.”

Fonto: https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001091.htm

Enigmo (de Felmano Ulriko)
.
Solvo de la lastnumera enigmo:
La enigma demando estis: kial aŭ kiel povas esti, ke Miguel de Cervantes kaj William Shakespeare mortis je la sama dato, sed ne je la sama tago? La respondo estas, ke tiam oni en Anglujo ankoraŭ uzis la Julian kalendaron, dekretitan de Julio Cezaro, sed en Hispanujo oni jam uzis la kalendaron reformitan de la Papo Gregoro, kiun ni hodiaŭ uzas.
Solvis la enigmon Gundhildo (tre rapide samtage) kaj Georgo, kiu sendis sian solvon kelkajn tagojn poste, sed ankaŭ sufiĉe rapide.
.
Nova enigmo:
La hodiaŭa enigma demando rilatas al la gramatiko de Esperanto. Vi certe scias, kion signifas la vorto "antaŭ". Imagu iu dirus, ke "post" ja estas la malo de "antaŭ". Pro tio oni ja povus diri "malpost" anstataŭ "antaŭ". Kion vi respondus al tiu aserto? Ĉu malpost vere estas samsignifa al antaŭ?